

KONGRESA KURIERO DE LA 97A UNIVERSALA KONGRESO EN HANOJO, VJETNAMIO

Solena Fermo

10:00 –12:00 de la 4a de aŭg.

- ① prezentado de surpodianoj
- ② silenta preĝo al forpasintoj
- ③ raporto pri la kongreso fare de Barbara Pietrzak
- ④ pri belartaj konkursoj: (n-ro 6)
- ⑤ pri la oratora konkurso: (n-ro 7)
- ⑥ publikigo de kelkaj premioj
- ⑦ raporto de diskutado pri la kongresa temo, fare de Mark FETTES: (n-ro 6)
- ⑧ ferma saluto de la prezidanto de UEA: (n-ro 7)
- ⑨ saluto kaj prezentado de LKK-anoj fare de Konstanta Kongresa Sekretario: Clay MAGALHÃES

Ferma saluto de la prezidanto de UEA

Estimataj kongresanoj,

Dum tiu ĉi evidente sukcesa kongreso, vi ĉiuj, vice de nia asocio kaj pli ĝenerale vice de la internacia movado, intensigis vian rilaton kun la generacie renovigata movado en Vjetnamujo. Vigle vi partoprenis ĉi tiun jubileojaran kongreson. Kvazaŭ por festi la 125-jariĝon, agante pere de via deputitaro, la Komitato de UEA, vi ŝanĝis la regulojn, per kiuj estas elektataj la estraroj. En Rejkjaviko vi elektos novan estraron. Anticipe al tiu ŝtupo, vi nun rigore debatas pri la strategio, kiun la asocio sekvu ekde 2013. La strategia forumo ĉi tie intensigis la debaton. Kiel ni komprenu la simbolan valoron de la fakto, ke tiel grava debato apogearo en lando kun renoviganta movado?

Alia Vjetnamujo en la sesdekaj jaroj, sur planedo vidata alimaniere, spronis rekomprenon de la senco de la internacia lingvo ĉe la esperantista junularo. El tiu momento venis grandega redirektiĝo de la streboj de UEA mem. Sed en 2012, ni jam ne plu loĝas sur la planedo de 1968. Ĉiuj klarege komprenas post Rio kaj Rio+20, ke la tero ne subtenos la universaligon de la konsumisma vivstilo. Hodiaŭ ni tial denove atendas la gvidadon de homoj dotitaj per la kuraĝo

de juneco. De homoj pretaj sin plenkore dediĉi al serioza profundigo de nia mondo-ŝanĝa vizio. El ilia rekomprena laboro nature sekvas pli efika versio de la esperantista strebado. Ĉar tian version vere komprenos kaj plenkore partoprenos la ĝenerala publiko en nia epoko.

La laboro serioze rekompreni la sencon de Esperanto kaj de la esperantismo sur la institucia kaj mobiliza nivelo ja estas farata en publikaj diskutoj. La ĉi-foja strategia forumo, malgraŭ la relative limigita diskutantaro, fartis pozitive. Sendube efikis partoprenemige sur niajn vjetnamajn gejunulojn la ebleco ĉeesti tian ŝlosilan procezon, kiu havos signifajn sekvojn en la tuja fazo de la itinero de UEA. En la dialektiko inter la esperantisma movado kaj la Esperante parolanta popolo, la strategia akso restas tre grava por la movado, kaj nia kono de tiu akso ege riĉiĝis dum la hanoja kongreso.

Kion tamen diri pri la popola poluso el tiu duopo? Kion ni post la kongreso pli klare vidas pri la Esperanta popolo?

Persone dirite, al mia kompreno pri tiu popolo plej rekte kontribuis la IKU-prelegoj de Humphrey TONKIN kaj Mark FETTES. Se vi ne ĉeestis ilin, vi povas legi la tekstojn en la IKU-libro. Tre resume dirite, Tonkin proponis, ke sub nia poezio kuŝas tavolo ideologia, kiun vole-nevole reeĥas eĉ la poetoj provantaj verki tute private, persone, ekstermovade; kaj Fettes prezentis perspektivon pri lerneja instrumaniero, kiu inicas la infanojn en daŭropovan, medio-prikonscian lernadon sub intime natur-partneraj kondiĉoj.

Tiujn du prelegojn kunligas temo, por kiu mi proponas la nomon Serioza Teraneco. Laŭ mia interpreto, ĉe Tonkin, la teraneco reeĥas la poezion de la pintaj Esperantaj aŭtoroj, kiuj ekzemple donacis al ni la magiajn vortojn “kantas de l’ tero ni filoj”, dum ĉe Fettes, la teraneco aperas kiel samtempe celo kaj vojo por tiu eduka revolucio, kiun la homaro bezonas tuj por povi savi sian karan teron. Sinsekve aŭskultante Tonkin kaj Fettes, oni eksentas, ke la Esperanta popolo estas avangarda portanto de kerna ideo necesa por tiu revolucio – la ideo de la serioza

teraneco.

La seriozaj teranoj ne estas simple kaj ŝablone pacamaj, amikaj, pontofaraj, intertraktemaj. Ili ankaŭ komprenas, kial necesegas draste transformi la lerneajn aranĝojn, ene de kiuj edukiĝas niaj infanoj. Por vidi tion, relegu la tekston de nia himno. Estas seriozaj teranoj tiuj, kiuj senmanke komprenas, kiom do la belaj sonĝoj de l' homaro, la imagpovo, la poezio gravas por ebligi la senbreĉan transdoniĝon de esencaj valoroj al fantaziemaj infanoj. Komprenas, kiom do la revoj gravas por ke kreiĝadu novaj valoroj ĉe imagemaj plenkreskuloj. Ne pro nenio nia poeto kaj pedagogo Marjorie BOULTON, ekzemple, elektas librotitolon *Faktoj kaj fantazioj* kaj intence ridindumas pri sia katmanio. La plenkreskado de seriozaj teranoj kiel ŝi neniam perdigas la plenan kontakton kun la planedo – kaj kun nia homa mondo, kaj kun natura tero apartenanta egale al homoj kaj katoj.

Mi diris “serioza”. Mi ne diris “solena”. Marjorie BOULTON estas tiel serioza, ke ŝi kapable ridindumas pri si mem, kaj ŝia memkarikaturo stilo inspiras la brilan pajacadon de Fraŭlino Barlastono. Ni Esperantaj popolanoj estimas Boulton ne ‘malgraŭ’ sed kune kun tiu ŝia ĉirkaŭnebulo de sinprimokado. La plej seriozaj teranoj estas tiel fortaj, ke ili facile ridas pri si mem.

La temo de Boulton portas min al azia poeto, kies heredaĵo peris mian konatiĝon kun ŝi. En 1977, tuj post la apero de elektitaj poemoj de la bengala aŭtoro Robindronath TAGOR en mia esperantigo sub la titolo *Primico*, Boulton faris tre afablan pozitivan recenzon de mia traduko. Ĉirkaŭ tiu momento, Boulton kaj mi ankaŭ persone konatiĝis dum la rej-kjavika UK, kaj mi mencias tiun fakteton nur ĉar ni ĉiuj jam pensas pri la denova UK okazonta en Rejkjaviko.

Tagor – kies poezion mi tiam ĵus tradukis kaj pri kiu Boulton profunde pensis kaj sentis por povi recenzi min – restas treege grava referenco por la pensoj, kiuj nin okupas ĉi-matene. Li vivis ikone ekzemplan vivon de serioza terano. Li estis fekunda poeto, kiu ne nur verkis dekmilon da poemoj, sed pro eksplicite la sama impulso funkciigis dum kvardek jaroj lernejon kaj dum dudek jaroj internacian universitaton, Visvabharati. Tiu institucia domarejo – ĝis hodiaŭ funkcianta – situas en Santiniketan, kampara loketo cent kilometrojn norde de Kolkato. Tagor havis la kuraĝon deklari, ke li stiras poetan lernejon kaj poetan universitaton, kie li komprenas la poezia spirito faros el tiuj studejanoj verajn, naturamajn teranojn. Li tre riĉe evoluigis la bazon de tiu kolektiva vivado, kie la personoj lernas

kultivi sin kaj partneri kun la homa kulturo kaj la tera naturo ĉirkaŭ si. Tagor komponis kantojn laŭ la sezonoj, kreis arboplantajn festojn, verkis kaj reĝisoris teatraĵojn por vigligi la lernejan kaj universitatan vivon, pentris, kaj sukcese kuraĝigis siajn junajn gekunulojn persone kaj kolektive aventuri por malkovri sian plenan potencialon en partnereco kun la naturo. Li ne nur gajnis la Nobel-premion por la literaturo en 1913; li ankaŭ fondis en 1921 Visvabharati, la unuan internacian universitaton en la homa historio, kaj havis la kuraĝon insisti, ke la du entreprenoj estas intime interligitaj.

Niaj vjetnamaj gastigantoj bonvolu atenti, ke Tagor ne akceptis la rajton de la nordaj landoj – tiutempe rolantaj kiel koloniestroj – dikti la koordinatojn aŭ la enhavon de internacia dialogo. Li laboris por starigi propran, sudan bazon por tiu dialogo, renversante la logikon de la glavo sangon soifanta. Tagor vizitis plurajn landojn ankaŭ en Azio kaj Sudameriko, starigante longperspektivajn konversaciojn kaj interŝanĝojn surbaze de egaleco inter la popoloj kaj aprezado de historiaj rilatoj rekonstruendaj post la imperiismoj. Kvankam li ne mem lernis Esperanton, li estis amiko de la ideo. Kiam li sendis junan instruiston de manlaboro nomatan Lakshmiswar SINHA al Svedujo en 1928 por ricevi trejniĝon pri tiufakaj instrumentoj, Tagor estis tre kontenta aŭdi, ke tie Sinha lernis ne nur la plej aktualajn metodojn sed ankaŭ Esperanton. Multaj el vi scias, ke Sinha havis brilan esperantistan karieron, sed ne scias, ke lia ĉefo Tagor ĝis sia morto en 1941 ĉiam rilatis pozitive al liaj Esperantaj agadoj.

Precize kial mi prezentis tiel detalan bildon de tiuj personoj? Ĉu nur pro tio, ke Sinha estis mia Esperanta mentoro? Mi ja ne volas malagnoski tiun fakteton aŭ ĝian gravecon. Sed estas ĉiuokaze necese, ke mi konkrete montru al vi ekzemplojn de seriozaj teranoj aldone al Zamenhof – Boulton, Tagor, Sinha. Nur per ekzemploj vere klariĝos al vi, kio do ligas por mi la inter si tre malsamajn IKU-prelegojn de Tonkin kaj de Fettes.

Ne miskomprenu, mi petas. Mi ja ne volas diri, ke nur esperantistoj estas seriozaj teranoj. Tagor estis serioza terano, kaj li neniam lernis Esperanton. Mi volas diri, ke esperantistoj povas fari el si universale rekonatan avangardon en la entrepreno de la serioza teraneco. La esperantistoj estas naturaj pedagogoj, kaj devas nur lerni kiamaniere eliri el la neuniversaligeblaj naciaj pedagogioj, en kiuj multaj el ni trovas nin kaptitaj.

Mi espereble sukcesis konvinki vin, ke nur kultivante la spiriton de la poezio la pedagogoj inspiras la infanojn al tiu nova tipo de homeco, kiu propr-

mane esploras la teron, amos ĝin, deziros konservi ĝin kiel loĝeblan planedon, kaj lernos en reciproka estimo loĝi sur tiu tero kun aliaj homoj malsame esplorantaj la propran poezian spiriton. Se Esperanto estas lingvo trempita en la poezio – se ni parolas esence poezian lingvon, kaj se do nia konata malpraktikeco estas fakte virto kaj ne handikapo – tiam ni povas tute logike konkludi, ke la esperantismo povas kaj devas sin evoluigi kiel edukon movadon kun lerneja fokusiĝo, preter la nuna limiĝo al la instruado nur de Esperanto mem.

Niaj gastigantoj, proponante la kongresan temon, komprenis sub la vorto ‘disvolviĝo’ la nacian ekonomian disvolviĝon. Se ni aldonas al tiu termino la nuancojn de la persona kresko, vi tuj vidus, ke fakte la kongresan temon mi miamaniere altraktis dum tiu ĉi parolado. Ĉu miaj vortoj estis al vi senutilaj? Mi petas do vian pardonon, kaj sugestas, ke vi rigardu ĉi tion kiel eseon pri la temo “Kiamaniere mi trovis la kongresan temon ege esplorinda”. La vera paco devas fondi el paco ne nur inter homo kaj homo, sed el paco inter homo kaj naturo, kaj tio povas okazi nur se ni funde transformas la koncepton de eduko mem. Ĉar Esperanto estas la lingvo de la paco kaj amikeco, ĝi devas finfine laŭ mi trovi vojon al tia ĉi vizio de amikeco inter la natura medio kaj ĝiaj homaj loĝantoj. Kun la espero, ke iuj el miaj vortoj renkontos ĉe vi konsenton, mi dankas vin pro via atento.

Probal DASGUPTA

raporto pri la faka kunsido “Ŭonbulismo”

09:00 – 09:45 de la 2a de aŭg.

Koredevena budhisma religio Ŭonbulismo havis fakan kunsidon sub la gvido de ŭonbulisma pastrino Sveka CHONG.

Korpe kaj mense ekzercante sin en meditado-gimnastiko (gvidate de HAN Sookhee) kaj en sidmeditado, (kun prezentado de OH Soonmo), ĉeestantoj ĝuis la kunsidon kaj ĵetis demandojn pri la religio Ŭonbulismo.

raportis LEE Jungkee (KN 229)

raporto pri la filmo “Tibor SEKELJ”

14:00 – 15:00 de la 2a de aŭg.

Kvindeko da spektantoj ĉeestis ĵaŭde en la prezentado de la filmo “Tibor SEKELJ: De Akonkagvo al Unesko”. Ĝi baze konsistas el la aŭtoritata prelego donita de Spomenka ŠTIMEC dum la pasintnovembra

Malferma Tago en la Centra Oficejo de UEA. Sed por doni al ĝi tuŝon de dokumenta filmo, “io nepra en la Jaro de Tibor SEKELJ”, laŭ filmisto Francisco L. VEUTHEY, “necesis tre bone ilustrati ĝin kaj parte ankaŭ reorganizi la gramatikon de la prelego”. La laboro daŭris du monatojn kaj kvankam la son-kvalito de la salono ne estis plene ideala, la kvindeko da ĉeestantoj tenis sin fidelaj al siaj seĝoj. La filmo estas montrata en kluboj kaj donas bonan okazon kleriĝi pri la vivo de la grava esploristo kaj aŭtoro de la dua Unesko-rezolucio favora al Esperanto. Ĝi estas ero de la Reta Kinejo de UEA kaj estas spektebla ĉe: <http://vimeo.com/36402930>

raportis Silvia ROTTENBERG
(KN 845)



Oratora Konkurso

14:45 – 16:15 de la 2a de aŭg.

Kuraĝe partoprenis la oratoran konkurson 7 kandidatoj el 6 landoj.

La unuan premion ricevis Michael BORIS MANDIROLA (Italio) kiu verve oratoris pri la temo “Esperanto en Interreto”. La dua premio iris al Rafael ENRIQUE ZERBETTO (Brazilo), kiu elektis la temon “Esperanto – ponto al paco, amikeco, kaj disvolviĝo”, kiu ankaŭ estas la kongresa temo. Trian premion ricevis LEE You-kyung el Koreio; ŝi teatrece parolis pri “la drako: ĉu timiga, ĉu alloga simbolo?” Honoran mencion ricevis Jérémie



SABIYUMVA (Burundo), kiu parolis pri la kongresa temo.

raportis Brian MOON

raporto pri LIBE-Kunsido

17:00 – 18:00 de la 3a de aŭg.

Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE) akceptis plurajn interesatojn fine de la sesa kongrestago. Sin prezentis 15 personoj el 8 landoj. La rolon de la ĉ.-400-membra LIBE skizis la kasisto Pier-Luigi DA COSTA (KN 620): ne vere por sin izoli de la aliaj esperantistoj oni fondis la Ligon, sed por pli facile informi unuj la aliajn pri novaj helpiloj kaj teknikoj. La propra organo “Esperanta Ligilo” aperas ekde 1904 brajle kaj lastatempe ankaŭ interrete. Sed gravas la persona kontakto en la Internaciaj Kongresoj de Blindaj Esperantistoj (IKBE), ĉi-jare okazinta en Ukrainio.

Tamen, ĉar Interreto faciligas la inform-interŝanĝon, la kongresoj nun pli servas amikecon kaj kulturajn interŝanĝojn.

La gastigan landon reprezentis s-ino NGUYEN Thi Ngoc Lan, kiu rakontis, ke ŝiaj ĉ. 80 blindaj Esperanto-kursanoj ĝenerale post la kurso reiras al sia hejmloko: malfacilas ilin trovi dise en la lando. Por la nuna kurso ŝi ricevis materialojn de JABE (Japana Asocio de Blindaj Esperantistoj). La sola ĉeestanta, s-ro Phan Ngoc Cung (KN 370) kiel muzikisto jam partoprenis en la Solena Inaŭguro, gitare kaj en la ĥoro de junaj vjetnamoj. Tre bonvenus por lia plua studo brajlaj angla-Esperanta vortaro kaj legolibroj. Rilate la ceterajn vjetnamajn kursanojn de s-ino Lan, s-ro Da Costa rimarkigis ke eĉ senpage LIBE membrigas ilin, kondiĉe ke ili sin anoncu por LIBE-aneco: tiel ili ricevos la organon brajle aŭ rete por subteni sian lingvonivelon.

LIBE krome eldonis la memlernolibron de la redaktoro de “Esperanto”, Stano MARĈEK, “Esperanto per rekta metodo” en brajloprezo.

El la ceteraj ĉeestantoj Jytte SUNEKAER (KN 464) salutis la ĉeestantojn nome de du danaj blinduloj.

La japano YAMANO Yutaka (KN 541) antaŭ 8 jaroj vizitis Hanojon kaj disponigis la blindulan asocion pri brajla presmaŝino. Nun li trovis la personaron altgrade kapabla, sed la aparato difektiĝis. Alia japano, HIKITA Akio (KN 522), lernis Esperanton antaŭ jaro (kaj parolis tute flue!), emeritiĝinte kiel la estro de lernejo, kiu sukcese okazigis memorfeston pri la fama rusa/ukraina aŭtoro Vasilij EROŝENKO.

Malajzia esperantisto, CHUI Lai Eng (KN 773) venis kun la celo ekscii kiel komenci agadon por sia-landaj vidhandikapuloj.

Interesiĝis ankaŭ unu el la junaj vjetnamaj kongresaj helpantoj, s-ino PHAM Minh Trang (KN 309). Aldo GRASSINI (KN 615) povis informi la polan eldoniston Jan SKONIECKA (KN 175), kiel ekhavi desegne reliefigeblan plaston, bezonatan por lernejo de blindaj kaj surdaj infanoj en Bydgoszcz, Pollando.

Entute vigla kaj informriĉa kunveno, gvidata de s-ro Da Costa.

Raportis Rob MOERBEEK (KN 53)

raporto pri “Surakva marioneto” prezentita en Esperanto

18:30 – 19:30 de la 3a de aŭg.

Okazis surakva marioneta prezentado en la Surakva Pupteatro Thang Long, kadre de la 97a UK. 200 partoprenantoj estis invititaj de UEA por spekti la prezentadon. Kvankam ĉi tiu nombro ne reprezentas la tutan spektantaron, la teatro prezentis la programon dulingve, en la vjetnama kaj en Esperanto por festi la eventon.

Ĉe la unuaj ŝtupoj de la ŝtuparo, Teŭĉjo ternante ŝildon kun la vortoj “Bonvenon al la 97-a UK” kaptis la koron de la alvenintoj. La programo de la spektaklo, tute originala, kun karakterizaj trajtoj de la vjetnama kamparo donis profundan impreson al la spektantaro, precipe fremdlanda.

Komisiono pri Informo de VEA



Tago de Vjetnamio

13:00 – 13:30 de la 29a de julio

En la inaŭgura ceremonio de “la Tago de Vjetnamio”, la Vjetnama Unio de Amikecaj Organizaĵoj transdonis memormedalon “Por paco kaj amikeco inter la popoloj” al 8 internaciaj geamikoj, kiuj pro sia laboro, kontribuis diversmaniere al la plifortigado de amikeco kun Vjetnamio:

Probal DASGUPTA (Hinda Unio), Baldur Ragnarsson (Islando), HORI Jasuo, SAIKI Akira, USUDA Reiko (Japanio), Franciska TOUBALE (Aŭstralio), Katalin KOVATS (Hungarujo), Ivanka STOYANOVA (Bulgarujo).

Post la ceremonio, sekvis serio da prelegoj pri Vjetnamio.

13:45-14:15

“**Vjetnamio survoje al renovigo kaj konstruado de la Lando**”. Pri la lando Vjetnamio prelegis la reprezentanto de Vjetnama Unio de Amikecaj Organizoj.

14:30 – 15:15

“**Ho Chi Minh kaj Esperanto**”. Prelegis TRAN Quan Ngoc, ke Onklo Ho konis kaj parolis Esperanton.

15:30 – 16:00

“**Vjetnamaj Medicinaj Plantoj**”. NGUYEN Xuan Thu prezentis simplajn kuracajn plantojn kultivatajn en hejma aŭ komuna ĝardenoj por kuraci komunajn malsanojn kaj ankaŭ rimedojn el medicinaj plantoj rezulte de scienca esplorado, produktitaj je industria skalo por kuraci gravajn malsanojn. La prelego estis ilustrita kun realaj specimenoj de kuracaj plantoj. Post la prezento, multaj homoj demandis pri specifaj kuracaj plantoj, kaj pri adresoj de institucioj, kie malsanoj estas kuracitaj per medicinaj plantoj kaj tradicia medicino.

16:30

Plantado de arbo omaĝe al la 97a UK: legu n-ran 3 de la kuriero.

14:00 – 15:00 de la 30a de aŭg.

Vjetnama Tradicia Robo – Aŭzajo: legu n-ran 5 de la kuriero. Prelegis LAI Thi Hai Ly.

12:45 – 13:45 de la 2a de aŭg.

En la kadro de la Tago de Vjetnamio, sed aranĝita por alia tago, la prelego “**Vegetarismo: Ne nur dieto, sed ankaŭ plezuro kaj arto**” altiris vastan aŭskultantaron, kiu estis invitita gustumi (senpage) artisme prezentitajn vegetarajn manĝaĵojn. (legu la suban artikolon.)

11:30 – 12:15 de la 3a de aŭg.

Quoc ngu, la moderna skribsistemo por la vjetnama lingvo. Prelegis HOANG Ngoc Boi.

raporto de Informada Komisiono de VEA

raporto de la prelego pri vegetarismo

12:45 – 13:45 de la 2a de aŭg.

S-ino LUONG Ngoc Bao prelegis pri la temo: vegetarismo, ne nur dieto sed ankaŭ plezuro kaj arto.

Dum sia prelego, ŝi ankaŭ prezentas tri pletojn de vegetaraj pladoj kun malsamaj prezoj. Post la prezentado, spektantoj estas invititaj gustumi senpage la prezentitajn manĝaĵojn.

Informada Komisiono de VEA



Internacia Arta Vespero

19:30 – 21:00 de la 3a de aŭg.
prezidis Mireille GROSJEAN el Svislando

El Belgio:

Marc CUFFEZ (du kantoj en la nederlanda)

Tri programeroj el Japanio:

UKITA Masaharu “Adiaŭ mia ĉevalo” per ŝakuhaĉo

SHIOMI Motohiko muzikis per arbofolio: “Kanto de ŝipisto de Rivero Mogami”

JAMADA Tadaŝi kantis la kanton “Sakura”

Ni studu nian literaturon.

Jen poemo “la Vojo” de Zamenhof

Unue deklamita de Graça Eliana Thuler SANTOS el Brazilo

Due kantata de KITAGAWA Hisasi el Japanio

Ni restas en Azio por spekti

El Ĉinio

GAO youming dancis “Tintsonoras Font’ ”

Ni saltu al Ameriko

Neil BLONSTEIN el Usono kantis kun gitaro, “Ĉu vi volas danci?”

Kaj ni iru suden al Brazilo

Kantado: “Almenaŭ” de Dirce SALES

Deklamado, “Songô” de brazila duopo: Mandel Borges Dos SANTOS

Kantado “Dankon Zamenhof” de Maria LAROCA, kaj aliaj

Kantado kun gitaro de brazila kvaropo

Afrika kvaropo

Kantado “Malaika”

Ni ne forgesu, ke ni estas nun en Azio. Jen nepala grupo: kantado kaj dancado de popola kanto

Indonezia grupo dancis



partoprenantoj en P1 (Postkongresa ekskurso 1) al Ho-Ĉi-Min-urbo kaj Kamboĝo, en 05-08 de aŭg.



partoprenantoj en P2 (Postkongresa ekskurso 2) al centra kaj suda Vjetnamio kaj Kamboĝo
en 05-11 de aŭg.

Trovita, la posedanto de la ringo!

En la 6a numero de *Loa!..Loa!..Loa!..* ni informis vin pri la ringo trovita en la kongresejo. Post la kongreso oni informis, ke la posedanto estas koreino. Estas decidite, ke mi redonos la ringon en la 99a Japana Esperanto-Kongreso en Sapporo, okazonta oktobre, al iu koreino, kiu partoprenos en la kongreso. Ŝi transdonos ĝin al la posedanto. Do tiel la afero estas solvota/ita, kaj la internacia vojaĝo de la ringo finiĝos senprobleme. Dankon pro la kunlaboroj de vjetnamaj kaj koreaj geamikoj.

Doi Ĉieko

El la redakतेjo

Tuj post la UK mi volis eldoni ĉi tiun numeron, sed pro multaj aferoj lasitaj hejme dum la UK tio ne eblis. Nun mi ĝojas, ke mi finas la laboron. Estis ĝoje por mi fari ĉi tiun laboron kun vjetnamaj kaj alilandaj geamikoj. Kvankam mi ne povis reale ĉeesti en abundaj interesaj programeroj, mi ne bedaŭras.

Ĝis revido en Rejkjaviko!

Doi Ĉieko (doi-cik@seaple.icc.ne.jp)